

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Raymond\\_Schwartz](https://eo.wikipedia.org/wiki/Raymond_Schwartz)

## **Raymond Schwartz**

Raymond SCHWARTZ [reMON ŜVARC] (la 8-an de aprilo 1894 - la 14-an de majo 1973) estis franca bankoficisto kaj esperanto-verkisto.

Li naskiĝis en Metz, lorena urbo tiam germana, sed en franclingva familio. Li ricevis bonegan edukadon kaj ne nur flue parolis la francan kaj la germanan, sed ankaŭ lernis la latinan kaj la grekan; tre frue li esperantistiĝis kaj revis pri paca estonteco danke al Esperanto. La unua mondmilito estis por li, kiu estis enarmeigita kaj devis batali sur la orienta fronto, terura seniluziiĝo. Post la milito li ne restis en Metz, denove franca, sed elmigris al Parizo, kie li laboris kaj fine emeritiĝis kiel kundirektoro de grava banko. Havante ian duoblan vizaĝon, li estis serioza kaj kompetenta homo en sia profesio, kaj samtempe ludis en Esperantistaj kabaredoj, kie li kreis multe da skeĉoj, tiel ke multe da Esperantistoj, kiuj lin nur supraĵe konis, lin imagis ĝoja drinkemulo.

Liaj skeĉoj kaj liaj libroj estas ege amuzaj kaj spritaj... Lia romano *Kiel Akvo de l' Rivero* (1963) estas unu el la plej longaj kaj bontaksataj romanoj en Esperanto.

En Parizo Schwartz gvidis la kabaredojn: Verda Kato (1920 - 1926), Bolanta kaldrono (1936 - 1939), Tri koboldoj (1949 - 1956). Li redaktis la ĵurnalon *La Pirato* kaj kontribuis per humuraĵoj inter alie al la *Sennacieca Revuo*.

### ***La Stranga Butiko***

***La Stranga Butiko*** estas 124-paĝa kolekto de poemoj originale esperantlingve verkitaj de Raymond Schwartz, kaj eldonitaj en 1931.

El la *Enciklopedio de Esperanto*, 1934:

“Liaj versaj verkoj *Verdkata Testamento* (1926) kaj *La Stranga Butiko* (1931), estas plenaj de la sukaj fruktoj de lia kurioza fantazio: kanzonoj laŭ kabareta stilo, ironia rezentado de strangaj tipoj verdaj kaj neverdaj, akre trafaj kaj milde pikaj observoj, spritaj vortludoj. Ĉio ĉi, prezentita per perfekta verstekniko, montras lin kiel simpatian bohemon, kiu havas tre sanan racion, grandan ĝukapablon pri la etaj ĝojoj de l' vivo, kompreneman ridon pri ĉiu homa malforto, sanan ironion pri ĉio gravmiena kaj hipokrita.”

Ni konsilas tiujn ĉi partojn de la libro kiel precipe amuzajn kaj interesajn:

- 1) Cirkulero
- 2) Oni malfermas butikon
- 3) Optimismo
- 4) Amo ĉiama
- 5) Profitulo
- 6) L' almozulo
- 7) Bona konsilo
- 8) **La diversaj aĝoj de l' homo** (eble la plej fama)
- 9) Aŭtunvesper'
- 10) Ne estas diferenco
- 11) Sintakso
- 12) Post la operacio
- 13) Morgaŭ maten'
- 14) Ni songis dum nokthoro
- 15) Averta
- 16) Moderna anĝeluso
- 17) Oni fermas la butikon